



8-6-1974

CGC N°
00406 504/1000-06

Conselho Brasileiro de Esperanto

BRASÍLIA – DISTRITO FEDERAL

PRESIDÊNCIA

Rua Galeão Carvalhal, 31 – AP. 73 Caixa Postal 07 – 1182
Telefone 4-8033
11.100 – Santos (SP)

SECRETARIA

Telefone 42-9090
70.000 – Brasília (DF)

Nº 22

JANEIRO/FEVEREIRO DE 1977

BOLETIM INFORMATIVO

Redação: MARIA ALMADA

LA ESPERANTO—MOVADO EN BRAZILŬ

Malgraŭ tio, ke multaj el niaj gesamideoj estas pesimismaj, niaj ĉiam respondecaj kunlaborantoj ekaktivis en la nova jaro.

La pasinta jaro finiĝis kun grandaj festoj tra la tuta lando. Tio signifas, ke nia kara Majstro Zamenhof ne estas forgesita. La memoro pri li ĉiujare iĝas pli ofta. En diversaj urboj kaj ŝtatoj nia anaro festis la 15-an de decembro.

En tiu ĉi jaro multaj sin preparas por festi la Semajnon de Internacia Amikeco, kio ja estas laŭdinda ago, ĉar ni ĉiuj havas esperantistajn geamikojn pri kiuj ni memoras kaj sendas al ili mesaĝojn. Estas nia devo elmontri, ke Esperanto estas ilo por amikiĝo, fratiĝo kaj bonvola interkompreniĝo.

La Semajno de Internacia Amikeco, kiu okazas ĉiujare inter la 20-a kaj 26-a de februaro, UEA varme rekomendas ĝian ampleksan feston kaj tiukaze informadon pri Esperanto en ĉiuj medioj.

UEA proponas kelkajn sloganojn: "Ankoraŭ ekzistas limoj – sendu salutojn trans ilin – Amikeco estas riĉaĵo en la vivo – Kulturu ĝin per afableco – La Semajno de Internacia Amikeco donas al ni okazon memori niajn amikojn per saluto aŭ donaco – La Semajno estas festata ĉiujare tra la tuta mondo kaj prezentas unikajn okazojn por kunligi ne nur esperantistojn, sed ankaŭ ne esperantistojn, en spirito de amikeco trans naciaj limoj".

Okaze de tiu ĉi festo, sendu ni almenaŭ unu bilkarton al iu amiko –(ino) tra la mondo.

---xxx---xxx---xxx---

LANSDOWNE, PA (Usono) — La prezidanto de BKE, prof-ro F.S.Almada, ricevis la jenan gratulleteron: "Kara Sinjoro Almada, Koran dankon pro la ekzemplero de via bulteno, kaj multajn gratulojn pro via bela agado en Brazilo. Akceptu plej korajn bonderizojn por prospera kaj paca jaro 1977, kiu alportu novajn sukcesojn en via Esperanta laboro. Kore salutas, Humphrey Tonkin", prezidanto de UEA kaj Societo Zamenhof.

---xxx---xxx---xxx---

ELEIÇÕES NO B.K.E.

Chamamos a atenção das Sociedades-Membros do Conselho Brasileiro de Esperanto que o mandato de sua Diretoria termina a 8 de junho de 1977, portanto deve-se proceder à eleição de nova Diretoria para novo período que irá de 8 de junho de 1977 a 8 de junho de 1980.

A Diretoria, de acordo com o Art.8º

de nossos estatutos, compõe-se de 4 elementos, achando-se em atividade no momento: Presidente — Francisco de Souza Almada; Vice-presidente exec.— Elvira Fontes; Secretário Geral — Nelson Pereira de Souza e Tesoureiro:— Carlos Augusto Siqueira da Cunha.

De conformidade com o § 2º do Art. 9º, o mandato da diretoria é de três anos, só podendo haver reeleição para mais um período consecutivo.

Assim, pois, solicitamos às Sociedades-Membros a fineza de nos indicarem uma chapa, nos termos do Art. 8º, isto é, 4 novos elementos para substituírem os atuais, obedecendo ainda o § 3º do referido Art. 8º que diz: "Os diretores poderão residir em qualquer parte do País, com exceção do Secretário e do Tesoureiro que serão domiciliados em Brasília (DF)."

A atual Diretoria está terminando o seu primeiro mandato.

Solicitamos às Sociedades-Membros enviarem-nos suas sugestões para o atual presidente, isto é, para a Rua Galeão Carvalho, 31 apto. 73, CEP 11.100 — Santos (SP). Gratos.

---xxx---xxx---xxx---

MENSAGENS

Por absoluta falta de tempo não podemos manifestar diretamente a cada um o nosso agradecimento pelas mensagens recebidas dos seguintes coidealistas:

RIBEIRÃO PRETO (SP) — Da S-ra. Antonieta Almada Miranda e Família desejando aos "primos" um maravilhoso Natal e um Feliz Ano Novo.

SALVADOR (BA) — Associação Bahiana de Esperanto e nosso vice-presidente José Saraiva Matos enviaram-nos votos de felicidade para o Ano Novo. Ainda de Salvador nossa coidealista Vivaldina Caymi enviou-nos seus "melhores votos de um "Feliz Natal e Ano Novo".

CAÇAPAVA (SP) — Nosso vice-presidente Gilberto A. Silva Velho igualmente brindou-nos com votos seus e de sua prestimosa esposa, desejando-nos Bom Natal e Feliz Ano Novo.

IRATI (PR) — Nosso samideano Ary Reis igualmente, enviou votos de Feliz Natal

à redatora deste Boletim.

GOIÂNIA (GO) — Da família Jesus Santos recebeu nossa redatora votos de "Feliz Natal" e "Prosperidade no Ano Novo".

RECIFE (PE) — Do nosso vice-presidente Amaro Pinangé Soares o CBE recebeu votos de "Feliz Natal e Próspero Ano Novo".

BARRA MANSA (RJ) — Em nome da Família Pereira Deslandes, recebemos da coidealista S-ra Denise votos de Paz, Saúde e Amor para todo o Ano Novo.

BELO HORIZONTE (MG) — De nossos sobrinhos e coidealistas Flávio, Vera e Aline recebemos "Nossos melhores votos para o Natal e o 77".

SÃO PAULO (SP) — O deputado estadual Jairo Maltoni, com cordiais cumprimentos apresentou-nos os melhores votos de feliz Natal e de um próspero Ano Novo.

SANTOS (SP) — Do deputado Federal Athié Jorge Coury recebemos "sinceros votos de um feliz Natal e próspero Ano Novo."

UBERABA (MG) — O presidente da cidade espírita "Leni Alves" enviou-nos votos de felicidade para o Ano Novo.

Desejamos agradecer de todo nosso coração tão belas mensagens e ao mesmo tempo manifestar a todos que sejam protegidos com saúde e prosperidade no decorrer de 1977, esforçando-nos em todo sentido para que o Esperanto progrida e uma num grande bloco os coidealistas de todo o mundo.

---xxx---xxx---xxx---

MONDONACÓJ

Ni ricevis kaj dankas al ĉiuj donacintoj la jenajn sumojn:

Seraphim Guedes	Cr\$ 100,00
Augusta S.O. Bueno	200,00
Antonio J. Pereira	500,00
Elvira Fontes	120,00
Maria Luiza Bilot	200,00
Majoro Gilberto S. Velho	100,00
Bauru Esperanto-Aocio	75,00
Sumo	845,00

KIEL AGAS LA BKE-ANOJ ?

CAÇAPAVA (S.P.)

Ni vicprezidanto, Majoro Gilberto Silva Velho, selace aktivas en nia

movado. Nia atestimata kunlaboranto elmontris eksterordinaran fortostreĉon. Ni publike rekonas kaj dankas lian klopodon por disvastigi Esperanton. Jen lia imitinda statistiko:

En la jaro 1976-a li verkis sciigojn por 16 gazetoj, kiuj aperigis 109 artikolojn pri Esperanto kaj ĝia movado. Li partoprenis kaj helpis pri nomumiĝo de stratoj en du urboj pri Esperanto. Persone li kontaktis diversajn deputitojn federaciajn kaj ŝtatajn kaj skribis al ili 91 leterojn pri la Esperanto-Movado. Kun diversaj instancoj li kontaktiĝis pere de 574 leteroj.

Li partoprenis plurajn aranĝojn, organizis en Caçapava esperantajn renkontojn, Faris paroladojn propagandcele pere de radio kvin foje, disdonis 82 librojn pri Esperanto. Li sendis al diversaj aŭtoritatuloj 1.123 gazetojn, en kiujn li sukcese enkondukis rubrikon pri nia movado. Li vizitis diversajn redaktorojn de gazetoj en diversaj urboj en sia regiono kaj helpas la movadon ankaŭ mone el sia poŝto.

Grandan sumon li jam elspezis por tio. Ĉion li faras en kadro de BKE, kies vicprezidanto li estas, volonte fortigi la movadon, elmontrante la utilecon de la internacia lingvo al aŭtoritatuloj kaj al popolo mem.

En la, lastaj tri jaroj s-ano Majoro Gilberto Silva Velho grandskale aktivis kaj ni povas diri, ke li estas unu el multaj BKE-anoj, kiuj grandigis kaj praktike savis la Esperato-Movadon en Brazilo.

Ni ne trovas sufiĉe taŭgajn vortojn por esprimi nian dankon kaj respekton al nia karega samideano Silva Velho, nur simple, sed el tuta koro ni diras: "Dio benu vin !"

---XXX---XXX---XXX---

SÃO PAULO (S.P.)

Nia vicprezidentino Elvira Fontes verkis por "Diário Popular", tre grava gazeto de nia ŝtata ĉefurbo, imponan artikolon pri Brazila Konsilantaro de Esperanto kaj ĝia laboro. Kore ni dankas ŝiajn afablajn vortojn rilate nian Informan Bultenon.

F-ino Elvira Fontes estas prezidantino de São Paulo Esperanto-Asocio, kiu estas unu el la plej aktivaj societoj en nia

lando, dank'al administrado efike direktata de ĝia prezidantino, dum kelkaj jaroj.

Tiu organizaĵo ofte aranĝas ekskursojn al aliaj urboj kaj regionoj, kio okazigas aperigon de multaj interesatoj al kursoj de Esperanto.

Ĝia librovendejo funkcias bone kaj estas lokita proksime al la Placo São Bento, kie troviĝas stacidomo de "Metrô".

La libro de nia vicprezidanto D-ro Walter Francini, "Esperanto Sem Preconceitos"; tre oportuna pro ĝiaj ege interesaj informoj, tial tre rekomendinda, estis lanĉita de São Paulo Esperanto-Asocio kun granda sukceso. Ĝi estas aĉetebla en la librovendejo de la Asocio. En la pasinta monato okazis solena vespermanĝo omaĝe al aŭtoro de la libro, nia tre estimata vicprezidanto Francini pro lia efika propagando de Esperanto.

BAURU (S.P.)

La "Sociedade Bauruense de Esperanto" sendis al ni sian bilancon kaj raporton pri la agado dum 1976. Estas laŭdinda la respondeco kaj serioza laboro de niaj diligentaj gesamideanoj, kiuj kun nemezurebla fortostreĉo klopodas por aĉeti propran sidejon.

Ni deziras al niaj karegaj gesamideanoj, ke ili sukcesu realigi tiun revon tiel bele planitan. Niaj vicprezidantoj Euclides Geraldís Carvalho kaj F-ino Maria Encarnação Moreno estas gratulataj de BKE pro la belega laboro farata en Bauru dum tiel efika administrado, kio garantias la sukceson. Krom la ekonomia parto de tiu societo, bonaj kursoj estas organizitaj, inkluzive la enkonduko de kursoj en la fakultaton. Ni gratulas kaj deziras plenan sukceson !.

---XXX---XXX---XXX---

SÃO MIGUEL PAULISTA (S.P.)

En la pasinta jaro Esperanto-Klubo Zamenhof, dank'al nia vicprezidanto D-ro Oswaldo Pires de Holanda organizis en sia propra sidejo diversajn renkontiĝojn. La 23-an de januaro la klubo festis sian 28-an datrevenon, kiun ĉeestis diversaj eminentuloj: deputitoj, advokatoj, akademianoj kaj profesoroj neesperantistoj, kiuj kuriozis pri la Internacia Lingvo. Krom ili ĉe-

tis niaj ciam kunlaborantaj vicprezidantoj prof-ino Elvira Fontes kaj Majoro Silva Velho. Ankaŭ ĉestis Gilberto F. Bartholomeu kaj la simpatia F-ino Heliana Lucia da Cruz Corrêa, membroj de BEJO.

En la kadro de tiu altnivela festo, por propagandi pri Esperanto, s-ano Silva Velho ekspoziciis bildkartojn por elmontri la internacian utiligon de la komunikilo esperanta. Krom la ekspozicio oni prezentis teatrojon kun granda sukceso.

La festo finiĝis, kiel kutime, kun la himno esperanta.

Ne povinte ĉeesti tiun kunvenon la prezidanto de BKE sendis gratulotelegramon al la societo dezirante sukceson al la evento.

---xxx---xxx---xxx---

SOROCABA (S.P.)

Nia vicprezidanto Manuel Blaz Garcia sciigas nin pri sia agado en la pasinta jaro. Estis organizita elementa kurso dum la periodo aŭgusto-novembro, kaj estis okazigita festo en la 15-a de decembro, naskiĝdato de nia Majstro L.L.Zamenhof, pri kio la gazeto "Diário de Sorocaba" informis kaj la Radio Klubo Sorocaba disvastigis Esperanton tra la cirkaŭaĵo.

En la monato februaro estas organizata festo rilata al Semajno de Internacia Amikeco. Ni gratulas s-anon Blaz, dezirante sukceson.

---xxx---xxx---xxx---

SÃO CARLOS (S.P.)

Gazeto de tiu ĉi urbo aperigis sciigon pri tio, ke grupo da studentoj gajnis premion ĉe literatura konkurso, kiun ĉiu jare organizas São Paulo Esperanto-Asocio: Jen la premiitoj: Marli Murakami, Negumi Yamakoshi kaj Francisco Vila Nova Neto. La temo estis "Esperanto estas solvo" — Ni gratulas.

---xxx---xxx---xxx---

SANTOS (S.P.)

La gazeto "Cidade de Santos" publikigis artikolon informante, ke "A Livraria Espírita ALVORADA" el Salvador (BA) adoptis Esperanton anstataŭ la anglan kiel ili tradicie agis, ĉe la eldono de libroj, uzinte "Printed in Brazil" de nun ili uzos

"Presita en Brazilo". Ni gratulas la progresman eldonejon.

Estas kunordigata nuntempe la programo de la XII Seminario de Esperanto, kiu okazos en Santos de la 14-a ĝis la 19-a de julio venonta.

---xxx---xxx---xxx---

LONDRINA (PR)

La gazeto "Folha de Londrina" aperigis tutpaĝan artikolon kune kun fotografado de nia Vicprezidanto Wilson Martins kaj S-ro Paulo de Assis pri Esperanto. S-ro Assis diris, ke en Londrina la Esperantomovado ekvekiĝas kaj en la venonta monato aprilo nova kurso komenciĝos.

---xxx---xxx---xxx---

CAMPOS (RJ)

Prof-ino Maria Luiza Bilot, vicprezidantino de nia BKE, sciigis nin ke la glernantoj de sia kurso "Bezerra de Menezes" en la 14-a de decembro memorfestis la naskiĝdaton de Zamenhof. Ŝi informis ankaŭ, ke la geesperantistoj de la spirita lernejo "Maria de Nazaré", kie ŝi ankaŭ estis, agale festis la seman datrevenon, kaj ŝi reprezentis nian BKE. — Ni kore dankas al prof-ino Bilot pro la agrablaj sciigoj.

---xxx---xxx---xxx---

BARRA MANSA (RJ)

Kun granda ĝojo kaj plezuro ni sciigas al ĉiuj niaj gesamideanoj, ke la Familio Deslandes fermis la pasintan jaron per ora ŝlosilo.

En la kadro de Kultura Kooperativo de Esperantistoj ili organizis esperantan kurson en tiugrava urbo, kiun gvidis prof-ro Amarílio Carvalho, kun granda sukceso. Diplomiĝis ĉirkaŭ 20 gelernantoj. La gazeto "O Lider" amplekse informis pri la solena transdono de la diplomoj. La eventon ĉeestis la reprezentanto de la urbestro D-ro Braz Cosenza, S-ino Denise, Lígia kaj S-ro Wilson Deslandes (organizintoj de la kurso), prof-ro Amarílio Carvalho kaj aliaj profesoroj de la M.O.B.E.G. — Nia vicprezidanto el Volta Redonda, inĝeniero Alberto Flores ankaŭ ĉestis. Ni gratulas la gesamideanojn Deslandes dezirante al ili daŭran sukceson. Kiuj volas ilin imiti?...

---xxx---xxx---xxx---

UBERABA (MG)

Nia juna amiko Hamilton Santos sciigis nin, ke la movado daŭre kreskas en tiu ĉarma urbo, kvamkam batalante kun grandaj malfacilaĵoj ili ne perdas la esperon nek la volon labori por Esperanto, ĉar ili kredas je Dio.

La kurson finis ĉirkaŭ 20 personoj en 1976. En la jaro 1977-a la grupo planas kurson kun 25 elementoj. La direktoro de Grupo Esperantista "MEIMEI estas la jena:

Prezidanto: Hamilton Santos

Vicprezidanto: F-ino Doralice Alves Franchi

Sekretariino: F-ino Teresinha Lucas Ferreira

Kasisto: Gedeon Donisette Gomes.

Feliĉigis nin la letero de la prezidanto Hamilton Santos, ĉar ni malofte ricevas leteron de junaj gesamideanoj, kiuj kredante je Dio batalas kaj venkas la malfacilaĵojn.

Batalo por. Esperanto estas preskaŭ preĝo.

Ankaŭ vi, kara amiko, restis en nia koro kune kun ĉiuj uberabanoj. Ni dankas viajn afablajn vortojn, kiujn ni recipokas, atendente vin en Santos por la venonta Seminario.

La libro de D-ro Walter Francini "Esperanto sem Preconceitos" estis ankaŭ lanĉita en tiu ĉi urbo kun granda sukceso.

---xxx---xxx---xxx---

JUIZ DE FÓRA (MG)

La monata revuo "O Lince" publikigis interesan intervjuon pridemanditan al prezidanto de BKE kaj al prof-ro José Passini, kun ĝeneralaj informoj pri la Lingvo Internacia, eluzante tri paĝojn, kaj montrante fotografaĵojn de la intervjuitoj.

En la sama urbo okazis la 15-an de januaro la enpostenigo de la nova rektoro de la Federacia Universitato de Juiz de Fóra, D-ro Sebastião de Almeida Paiva, kio fariĝis en la Salono de la Jura Fakultato. La ceremonion ĉeestis la prezidanto de BKE, prof-ro F. S. Almada kaj la vicprezidanto Prof-ro José Passini, katedra prof-ro de tiu Universitato, pri lingvoj, inter kiuj Esperanto.

MURITIBA (BA)

Prof-ro Manuel Borges, vicprezidanto de BKE informis, ke en Muritiba la radiostacio, kies ondoj atingas multajn najbarajn urbojn, ĉiudimanche je la 7-a horo dissendas kronikon pri Esperanto. Nia S-ano kunlaboras kun la loka gazeto "O Correio de São Felix" kaj estis invitita fari paroladon ĉe la kurso INCRA pri kooperativismo, kion li plenumis antaŭ 50 personoj.

Li propagandis pri Esperanto samtempe. Gratulon!

---xxx---xxx---xxx---

SALVADOR (BA)

Nia senlaca kunlaboranto kaj vicprezidanto de BKE estas s-ano José Saraiva Matos. Li estas brava batalanto, tre sincera kanlaboranto kaj tre eksterordinara esperantisto. Dum la tuta pasinta jaro la vicprezidentaro de BKE ricevis la belegan revuon "Viverbahia", organizis kursojn, klopodis unuigi la esperantistaron, kaj ĉeestis la XI-an Seminarion en Brazilio. Li ĉiam sendas novaĵon por nia bulteno, pro ĉio ni estas dankaj al s-ano Saraiva Matos.

---xxx---xxx---xxx---

PELOTAS (RS)

Nia vicprezidanto Paulo Domingos Caruso informas, ke en la venonta monato marto li organizos esperantan societon. La 12-an de marto okazos la fondiĝo de tiu societo, fare de grupo da professoroj direktota de li. Tiu societo funkcios en la kolegio "Santa Margarida", kie ekzistas taŭgaj salonoj por instrui la lingvon. Propagando jam estas farata pri la kurso. Ni deziras plenan sukceson al nia samideano kaj prosperon al E.S.P.E.L.

Kiu imitos Pelotas?! — Lernante la lingvon ni forton pli freŝan akiros.

RIO DE JANEIRO (RJ) — Brazilia Esperanto-Ligo

En la 29-a de la ĵus pasinta januaro B.E.L. okazigis kunvenon de sia anaro por aprobi la raporton kaj kontojn de la pasinta jaro.

La evento komenciĝis solene sub la gvidado de ĝia prezidanto, S-ro Luiz Alberto Martins. Ĉeestis 18 personoj, inter kiuj troviĝis la reprezentantoj de Vitória (ES), San-Paŭlo (SP), Juiz de Fóra (MG)

kaj pluraj el Rio de Janeiro (RJ). Parte de Kultura Kooperativo de Esperantistoj, sano Lazarus Brieger. El Santos, la reprezentanto de Centro Esperantista de Santos kaj la prezidanto de Brazila Konsilantaro de Esperanto, prof-ro F. S. Almada, akompanata de la simpatia samideano prof-ro Amarilio Carvalho, el Rio de Janeiro (RJ).

Per mallaŭta voĉo estis tralegitaj la bilanco kaj raporto pri la agado de B.E.L. dum la jaro 1976-a. La laboro konsistis el: vendado de libroj, kursgvidado korespondaj kaj eldono de la "Brazila Esperantisto" oficiala organo de la Aŝocio, kies enhavon oni ĉerpas el diversaj internaciaj gazetoj por diskonigi al bonaj brazilanoj.

La programo por la nuna jaro estas la sama sed okazos en decembro la balotado kiu elektos la novan estraron de la organizo.

La prezidanto Martins bonvole kaj afable respondis la malmultnombrajn demandojn direktitajn al li.

Finfine la ĝenerala sekretario parolis pri la agadmaniero de la liganoj. Li menciis ĉefe, ke malmultaj el ili aktivas. Spite de iliaj titoloj nur li kun unu el la estratanoj aktivas fakte, la aliaj nur portas la titolon. Nu, tio ne estas surprizo, ĉar en preskaŭ ĉiuj organizadoj tiel okazas.

Ni vidas, ke en nia movado nur unuopuloj aktivas kaj tamen la movado ekzistas. Kio okazus se ni eklaborus almenaŭ dekoje?! . . . Certe Esperanto estus multe pli konata en Brazilo.

Post la fino de la kunveno la plimulto tuj rapide malaperis. Postrestis nur la plej kuraĝaj, kiujn poste la pluvego surprizis kaj longe retenis en la sidejo.

---xxx---xxx---xxx---

NI KUNLABORU KUN LA INTERNACIAJ FAK-ASOCIOJ

La esperantistaj fak-asocioj celas prezenti en diversajn mediojn la lingvan solvon de Esperanto per kunordigita tutmonda agado. Estas do tasko de ĉiu samfaka esperantisto kunlabori en tiu grava agado. Lastatempe alvenis tri alvokoj, kiujn ni metas je la atento de niaj gelegantoj:

— Internacia Poŝtista Kaj Telekomunikistista Esperanto — Asocio (IPTEA)

En februaro 1976, la Asocio sendis al 240 poŝt-administracioj, membroj de Universala Poŝta Unio, informan leteron proponante Esperanton kiel oficialan laborlingvon de la Unio mem. Tiu estis nur la unua paŝo de Kunordigita agado, kiu devos konvinki almenaŭ unu poŝt-administracion prezenti oficialan proponon en tiu senco, dum la venonta monda kongreso de la Universala Poŝta Unio, kiu okazos en Brazilo dum la jaro 1979—a! Jen do la grava respondeco de ĉiuj brazilaj esperantistoj: krei la premisojn por ke tiu propono estu akceptita kaj servu kiel signifoplena antaŭpreparo por nia Universala Esperanto-Kongreso dum la jaro 1980—a. Pro tio ni alvokas niajn gesamideanojn, kiuj profesie laboras en la poŝtistaj kaj telekomunikistaj instancoj aŭ kiuj konas funkciojn en tiu medio, por ke ili kontakta plej baldaŭ nian Konsilantaron cele al starigo de taŭga laborplano.

Brazilo jam havas tradicion en la uzo de la Internacia Lingvo en la poŝto kaj sekve ne estos malfacile atingi konkretajn rezultojn, kondiĉe kompreneble, ke ni ĉiuj kunlaboru.

Internacia Esperanto-Klubo Aŭtomobilista (IEKA)

Celo de la klubo estas aplikadi Esperanton kiel solvon de la lingvo-problemo en aŭtomobilistaj medioj. Tiu problemo sentiĝas precipe en Eŭropo, kie aŭtomobilisto devas ŝanĝi pli ofte lingvon ol oleon, dum iom Jongaj vojaĝoj! Pro tio, ĝis nun, la klubo havas pli ol mil membrojn ĉefe en Eŭropo kie ĝi jam kontaktis plurajn naciajn aŭto-klubojn prezentante al ili la avantaĝojn de Esperanto kaj instigante ilin eldoni frazarojn en la Internacia Lingvo. Sed ankaŭ en Brazilo, kie aŭtomobilismo estas tre populara, estas eble efike labori en tiu medio, kondiĉe ke ni povu prezenti atendindan nombron de esperantistaj aŭtomobilistoj.

La aliĝo al Klubo estas tre simpla kaj sen formalajtoj.

Dumviva kotizo sumas nuntempe je nur 30 kruzeiroj kaj oni ricevos glu-insig-

non por apliki sur la antaŭ-glacon de la aŭtomobilo. Reprezentanto de la klubo por Brazilo estas S-ro Giuseppe Grattapaglia — Caixa Postal N^o 04-0097 — 70.000 — Brasília (DF), al kiu oni povos sendi la kotizon, prefere per ĉeko pagebla en Brazilio.

---xxx---xxx---xxx---

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI)

De tempo al tempo, brazilaj parlamentanoj, amikoj de Esperanto, prezentas leĝprojektojn por la enkonduko de la instruado de la Internacia Lingvo. Sed ĉiu parlamenta iniciato, sen apogo de la bazo, ne povas sukcesi. Tiu "bazo" devus esti forta asocio de Esperanto-instruistoj, kiu internaci-skale jam bone laboras en tiu kampo. En Brazilo ne ekzistas ĝis nun sekcio de ILEI, kvankam multaj geinstruistoj sindediĉas kun sukceso al la instruado de nia lingvo. Ni alvokas ĉiujn geinstruistojn, kiuj deziras labori en tiu fako, por ke ili sin anoncu ĉe nia Konsilantaro kun la celo starigi sektion de ILEI en Brazilo.

---xxx---xxx---xxx---

FORTALEZA (CE) — Alvenis la "Fenikso", organo de la junularo de Ceará, n^o 1, kiu informas detale pri Esperanto kaj ĝia progreso ek de la jaro 1887—a. En la Federacia Universitato de Ceará funkcias Esperanto-kurso inaŭgurita en la 30-a de junio, 1965. Informas "Fenikso", ke la Universitato iniciatis korespondan Kurson pri Esperanto en 25 lecionoj, kaj donas ateston. La kosto estas Cr\$ 150,00. — Oni anocas:

"Você também pode e deve aprender a Língua Internacional. SUA IDADE não importa, nem sua profissão, pois todos, em qualquer idade, seja qual for o seu trabalho, têm o direito de aprender e usar esse idioma comum a todas as pessoas. LUCROS E VANTAGENS. — Você ganha muito com o aprendizado do Esperanto.

1^o NOS ESTUDOS, seja qual for sua especialidade, você poderá consultar obras escritas por especialistas de outras

pátrias, todas editadas na Língua Internacional.

2^o **COSTUMES E CULTURAS** de países distantes chegarão ao seu conhecimento por meio dessa literatura.

3^o **NAS VIAGENS** você fará inúmeros amigos entre todas as raças, nações e povos do mundo, pois para o Esperanto não há fronteiras.

4^o **ATÉ MESMO** sem você nunca sair de casa poderá entrar em contacto com outros povos, pela correspondência e por intermédio de programas de rádios, transmitidos na Língua Internacional por emisoras de países de idiomas diferentes do seu mas que entram em sua casa e lhe vão dar o prazer de conhecer novos mundos de vida.

Peça informações à Universidade Federal do Ceará, Praça da Gentilândia 50 ou Caixa Postal N^o 1221 — CEP 60.000 — Fortaleza (CE)".

---xxx---xxx---xxx---

NIAJ AKTIVULOJ —

Inter aliaj diligentaj kunlaborantoj elstarigis ankaŭ niaj samideanoj: jurnalistoj Belmonte de Abreu, el Porto Alegre (RS) kaj la Prof-ro Wanderley Peres el Indaiatuba (SP). Al tiuj niaj komprenemaj kaj klopodemaj samideanoj ni ĉion dankas.

---xxx---xxx---xxx---

LINGVAJ PRIKOMENTOJ

Dragutin Wranka (Argentino)

Oni ne konfuzu "EN" kun "DUM". La prepozicio "DUM" (latindevena) montras la tempon en kies daŭro io okazas. Ekz.: "Fleksu arbon DUM ĝia juneco" — "DUM la parolado li dormis" — "Apetito venas DUM la maĝado". — Ĝi montras plie samtempecon. Ekz.: — "DUM la gastoj foriris li staris en la pordo" — "DUM li alportis la bieron, li trinkis el ĝi la duonon". — Ĝi estas subjunkcio se ambaŭ agoj estas pli malpli daŭraj. Ekz.: — "DUM vi skribos la leteron, mi legos ion" — "DUM la kantistino kantis, ĉiuj silentis atente. — "DUM vi estos feliĉa, vi havos multajn amikojn". — Se oni volas marki kontraston oni povas uzi "DUM" kaj

"DUME". "Li estas kuraĝa DUM lia frato estas leporkorulo" — "Vi nur babilis, kaj DUME mi laboris anstataŭ vi. — Ĉi sube mi daŭrigas doni kelkajn ekzemplojn el Argentina lernolibro erara uzo de "DUM" en jenaj frazoj: "DUM la nokto la manoj kaj piedoj ripozas anstataŭ: "EN la nokto la manoj kaj... — "Ofte DUM vintraj matenoj la termometro montras... anstataŭ "Ofte EN vintraj matenoj la termometro montras... "DUM printempo la ĝardenoj floras — anstataŭ "EN printempo ktp. — "DUM aŭtuno estas multaj fruktoj—anst. "En aŭtuno... ktp. — Kia estas la vetero DUM julio? — anst.: "Kia estas la vetero EN julio? — Ŝu vi ŝatas trinki varman ĉokoladon DUM somero? — anst. "Ĉu vi ŝatas trinki varman ĉokoladon EN somero?"

La daŭron oni provas montri ankaŭ per akuzativo. Ekz.: "Mi veturis de Rio de Janeiro al Santos unu tagon." — "Mi restis tie tri tagojn — La daŭron oni povas montri ankaŭ per prepozicio. — Ekz.: "TRA", Kiam la ago multfoje ripetigas dum la indikita daŭro — La koko krias TRA la tuta nokto" — Aŭ per "EN la

daŭro de" — Ekz.: "EN la daŭro de kelke da minutoj mi aŭdis du pafojn" — Aŭ per "POR" — Ekz.: "La Eternulo transdonis ilin EN la manojn de la filistoj por kvardek jaroj. Do per "POR" kiam oni indikas ne la daŭron de la ago, sed la daŭron de la stato. — Ekz.: "Mi pruntis al li la libron "POR" unu semajno — Aŭ "Doni ion al iu por ĉiam" — Fine la daŭron ankaŭ per la prepozicio "EN". — Oni precipe atentu ne konfuzi DUM kaj EN. EN indikas tempon necesan por fari agon, do oni atentu, ke temas pri "Tempo necesa". Ekz.: "Li parolis DUM kvin minutoj sed neutile, ĉar tiajn demandojn oni ne povas respondi EN kvin minutoj" aŭ "Mi finis la tutan libron EN kvar tagoj" — aŭ "La junulo atingis la supron de la piramido EN dek minutoj. Do dek minutoj estas la "tempo necesa" por atingi la supron de la piramido. — aŭ "Mi finis la tutan Esperanto-kurson EN unu monato" — "Monato" estas tempo necesa, sed oni povas diri DUM unu monato mi jam studas Esperanton — aŭ "Jam unu monaton mi studas Esperanton, do per akuzativo. (Daŭrigota).

---XXX---XXX---XXX---

BALANÇO GERAL DO BKE DEZEMBRO DE 1.976

ATIVO

I — Disponível			
CAIXA			
Em Brasília (DF)	242,39		
Em Santos (SP)	1.435,40	1.677,79	
BANCOS		801,02	2.478,81
II — Realizável			
Bens recebidos em doação			910,00
III — Imobilizado			
Impressos e objetos de escritório			437,75
Total			<u>3.826,56</u>

PASSIVO

I — Não exigível	
FUNDO SOCIAL	<u>3.826,56</u>
Total	<u>3.826,56</u>

Tes.: Carlos A.S.Cunha